
EKE esperanto

**Kunveno: merkredon la 17an de majo 2023a**
**je la 20.00 h. en “De Uitwijk”,**
**Generaal Pattonlaan 124, Eindhoven.**
**tel. 040-2450590.**

# Libroj




La programon prizorgos: *Rob*.

Ĉiu el ni prezentos al la klubo unu libron. Aŭ, se vi tiel deziras, eventuale eĉ libroserion.

**Sed:** La grava punkto por tiu ĉi fojo estas ke la libro kiun vi prezentos al ni, estas libro kiun vi **ne** legis en *esperanto*. Ĝi eĉ *ne ekzistu* en esperanto. Sed vi ja *prezentu* ĝin al ni *en esperanto*. Ĉu vi legis ĝin en la nederlanda, la angla, la germana, la franca aŭ en iu ajn alia lingvo: tio ne gravas.

Ne gravas antaŭ kiom da tempo vi legis la libron. Ĉu antaŭ du semajnoj, ĉu antaŭ du monatoj, ĉu antaŭ du jardekoj... Ĉiu via elekto estas bona. Estus interese se vi povus kunporti la libron kaj ĝin montri al ni.

Preparado do nepre necesas.

Se vi volas kontroli ĉu la libro efektive ne ekzistas en esperanto, iru al la katalogo de UEA kaj serĉu ĝin, ekzemple per la nomo de la aŭtoro.